

Heinrich Heine,
La mizera Petro

tradukita de Manfredo Ratislavo

1

Dancante turnas ĝoje sin
Johan' kaj Margareto.
Sed mutas Petro jen sen in'
Kaj palas kiel kreto.

Nun festas tre pompe la paro ĉi
En la geedziĝ-ornamaĵo,
Sed Petro mordas la ungojn al si
Kaj iras en simpla vestaĵo.

La Petro parolas mallaŭte al si,
Aflikte rigardas ĉion:
Se estus ja ne raciema mi,
Mi farus al mi ion.

2

»En mia brusto sidas ve',
Ĝi volas min disigi:
Elteni ĝin mi povos ne,
Ĝi volas min mortigi.

Pelata al la karulin'
Mi estas kun espero;
Sed kiam mi ekvidas ŝin,
Forpelas min sufero.

Ĝis monto-supro iras mi,
Sur kiu homoj foras;
En la solec' pro emoci'
Malĝoje mi ekploras.«

3

Mizera Petro iras jen
Tre lante, pala pro ĉagren';
La homoj, kiuj vidas lin,
Surstrate eĉ haltigas sin.

Knabinoj flustras inter si:
»Eliris el la tombo li.«
Aĥ ne, fraŭlinoj karaj vi,
Sin entombigos tiu ĉi.

...

Plej bona estas tio ĉi,
Ĉar sian inon perdis li,
En tombon li kuŝigu sin
Kaj dormu ĝis la monda fin'.

*Traduko de la Germana poemo "Der arme Peter" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984.*

MR-120-1 / Arg-214-422 (2004-03-15 00:00:22)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romanoj“, n-ro IV.